

PENSEO

N-ro 354

apr. / 2021

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 32-a jaro <http://www.elferno.cn/penseo/penlisto.htm>

Maria Nazaré Laroça (Brazilo)



Ataraksio en la pandemio

En ĉi tiuj tagoj turmentaj,
jen dezir' reiri tempen,
por kunvivado en Ateno,
en la Ĝarden' de Epikuro.

Verŝajne mi liberigos
de l' pez' de ĉi tiu ekzisto,
de l' rigidec' de l' animo,
de l' dolor', kiu frenezigas
la sanstaton de l' ostoj.




La leĝerecon mi volas
de la moderaj plezuroj,
la vere dolĉan simplecon,
trinkante filozofion
el la serena feliĉo.

Juiz de Fora, 05/03/2021.

Rita Mkrtchyan (Armenio)



Via Moŝt' — socia reto!
Ĉioeblo, ĉiopova,
Ni ricevas la respondojn
Nur per unu simpla movo.



Ni “nudigas” la animon,
Sed ne nian, la alian
Kaj atendas la legantoj
La novaĵojn tre variajn.
Ĵurnalistoj kaj verkistoj,
La lingvistoj, profesoroj,
Ni ripetas — ege sperta,
Sed ne diras — bona homo.
Niaj karaj geamikoj,
Se ni tuŝu politikon
Iĝas tuj nekonatuloj,
Inter ni aperas “muroj”.
Dialogo, povas esti
Kontinuas kelkaj tagoj,
Kaj en “kampo” politika
Kolektiĝas “batalantoj”.
Ni ŝanĝiĝis eble ĉiuj,
Estas klare la kialo,
Translokiĝis ĉiuj homoj
En la mondon virtualan.
Kiel la proverbo diras,
(Ni ŝanĝigos iomete),
En barel' de gudro estas
La kulero de mielo.
La mielo — estas vortoj
Bonaj, varmaj kaj sinceraj,
La naturo kaj muziko,
La informo bonefika.
Bondeziroj karaj, belaj
Estas la amikoj veraj,
“Maro” — sen furiozaj ondoj
En la sama “reta” mondo.

Mia kanto

Trezorojn mi havas, senfundajn, senlimajn,
 Kaj riĉa mi estas, ĝana, (karega) tre riĉa,
 La mar' de boneco, talento kaj amo,
 Donaĉon tre luksan mi ree ricevis.
 Profunda minejo de mia trezoro,
 Estas la kor' mia riĉa, libera
 Kaj kiom da estu senpaga disdono
 Senfinas la amo, por ĉiu — la bono.
 La timon ne havas, ne timas entute
 Ŝteliston, la plagon aŭ iun malbonon,
 En mondo mi solas, jen kiel okazis,
 Sed de alteco mi ĉion disĵetas.
 Riĉa mi estas kaj estas feliĉa,
 En luma tago de mia naskiĝ',
 Neniam revenos en mondon denove,
 Kion ricevis— redonas al ĝi!

okaze de Tutmonda tago de Poezio

Poemo de fama armena verkisto, poeto—Hovhanes

Tumanĵan

tradukis **Rita Mkrtchyan (Armenio)**

Wally du Temple (Kanado)



Progreskaptiloj

Paŝsana homo
 Inventas transportilojn
 Aŭtojn kaj liftojn.
 Malmuskoliga progres'.
 Iru gimnastikejon!

Midĝli inventis
 La freonan fridujon.
 Ĉiela truo!
 For ozona ŝirmilo
 Nin hantas haŭta kancer'!

Piŝta motoro
 Karbona haladzo tro
 Olea epok'
 Varmiĝas la klimato

Detrua progresilo!

DoDoTo venen'
 Insekticido aĉa
 Mortas la birdoj
 Raĉel Karson verkas la
 La 'Silentan Printempon'.

Scienco misa!
 Homo rompas atomon
 Bruliga bombo
 Nuklee mortigas nin
 Fina progreskaptilo?

FRATO MEFITO


Mefito la avataro de paŝa memfido.
 Korpa sinteno mova ne estas la perfido.
 Vosta svingo kaj promeno jenas memrespekto.
 Memsento sen egoismo estas sendifekto.
 Mefito montras, ne necesas ĉikani, vundi
 Ataki, turmenti, blasfemi aŭ superforti,
 Kiam ĉiuj fibroj same vibre resonancas
 Ĉar via vivo sendube, senperturbe dancas.
 Konu vin mem kiel mefito kiu odoras
 Ĝenu!' hezitos kiam vi okupon adoras.

Fratina Kolibro

Kolibro instruas al Indiĝena popolo,
 Estiĝu Kolibro en ega tragika rolo.
 Estu paroksismo, de ĝojo, vibre, kolore.
 Suĉu dolĉan la nektaron de vivo senbride.
 Fratina kolibro montras ke ĉiudirekten
 Indas belon serĉi supren, suben, dekstren, ien.
 Korojn gehomajn malfermas plum-brila
 kolibro
 Ke la vibranta zum-danco neniam satu tro.
 Tamen kiam manĝaĵoj malabundas ripozu.
 Toporu nokte, metabolan rapidon bremsu.
 Viv-saviga por flug-ĉasantoj de plumoj buntaj
 Instrua sci' por indiano kun vestoj peltaj.
 Triba, ŝveba-danco la bestojn pli-abundigos.
 Fantomaj korpoj homaj kolibrojn dignigos.
 Se vi zumas kolibre pere de alt-frekvenco

Flugu tra la mondo per kolibro-viv-esencoj.

Zara Sarkissianne (Francio)



Sen titolo

Ploras la tempo
 Tristas la birdet'
 Serĉas la sunon,
 Trovas la pluvet'.
 Kuradas la tempo,
 Murdas ĉagrenet',
 Songas printempo,
 Kantas kardelet'.
 Parfumas la ĉiel',
 Floras l' arbaret',
 Sunas la tagmez',
 Aperas la ridet'.
 Revenas la amo,
 Amkisas birdet',
 Daŭrigas la vivo,
 Brilas sunreflekt'.

08/03/2021

Siv Burell (Svedio)



MUZIKO

Tiu estas riĉulo,
 kiu havas muzikon,
 ĝuas muzikon,
 produktas muzikon,
 aŭdas muzikon.

La tuta domo plenas je muziko,
 MUZIKO, MISTIKO, MUZIKO,
 kiu ensorĉas,
 malligas la plektaĵojn de la fantazio
 mildigas amarecon,
 fortigas ĝojon,
 instigas al miro,
 ŝanĝas perspektivon,
 donas novan vivon,

kuracas vundojn.

Tro multe da televido

La televido englutis la knabon
 Ĉirkaŭaĵon li nek vidas, nek aŭdas.
 Tagon la patrino venante
 interrompis la vidadon dirante:
 "Iu malĝojo okazis –
 onklo Tim tagmeze forpasis".
 "Vere", diris la knabo,
 restante en mondo de krimoj,
 "kiu mortpafis lin?
 Aŭ ĉu li mortis pro vundoj de glavo?"

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Du grupoj da haykoj

Sonoriletoj
 blanka sono en ĝarden'.
 Vokas l'printempon

La tero blanka-
 l'glitejo vivoplena
 Larmoj el ĝojo.

Amara ĝojo
 kisas mian vizaĝon.
 Doloras l'anim'

Trans la fenestro
 La luno kaŝrigardas
 . Ho, scivolemo

Piednuda aŭtun'
 L'vento pelas foliojn
 Vintro ĉe l''sojlo
 ** **

Ĉambro.Piano.
 La klavoj ekŝtormegas.
 Matena kafo.

Senluna nokto
 ie plorĝemas gitar'

Soleca seĝo.

Kato soleca
ĉe la sojlo tremeĝas.
La domo mutas.

Timema cervin'
trans la padoj forkuras.
L' ĉasistoj gvatas.

Jadranka Miric (Serbio)



Kiam Marto printempas

Jen ,malgajaj surprizoj:
subneĝe floretaj kapoj leviĝas.
Vigle neĝeroj kvazaŭ rizoj
falas. Sutreriĝas.
Neĝa ŝtormeto.
Blankiĝas tero.
Ruĝiĝas ŝia nazeto
plenplena de neĝeroj!
Subita ŝanĝo de veter',
pasis ŝtorm' kiel venis.
Denove suniĝas sur la ter'.
dank` al Panjo Marta afer'.
Printempas Mart'.
Aŭdiĝas la birda pepad'.
Miksiĝas kun homa kantad'.
Vivu naturo-art'!

Nebula rakonto

Rapide vesperiĝis.
Dume grize nebuliĝis,
la stratlumigiloj ne plu vidiĝis,
nek la fingro antaŭ okuloj vidiĝis!
Baldaŭ malaperos hotelo kaj tiliar'.
Sur la strato eĥis paŝoj de brakumita par'.
Ie en mallumo aŭdiĝis hunda bojado
kaj de korvoj sur la branĉar' grakado.
Baldaŭ sensone ĉio droniĝos en malhelo.
Frua vintra frosta maten' rapide
venis vestita per vuala saten',

kaptinte nin aranee perfide!

VIA AMO

Kiam amo fajretas en la koroj
mankas al ni ĉiuj horoj
por la teneraj duonkaŝitaj rigardoj
kaj manenmane longaj promenoj!
En la okuloj inkkoloraj
mi serĉis stelbrilon,
memore al la tagoj oraj
kaj de unu delonge forgesita "pardonon"!
Via amo estas mia indentigilo.
Vi kiel savopajleto, mi dronanto .
Fariĝis vi mia pasporto por la viv-savanto,
malgraŭ onidiroj ke vi estas mia kaptilo.

Mimoza Ahmeti



"Jen, ankoraŭ iomete"

Jen, ankoraŭ iomete, la febroj ĉe mi ekkantos.
Subtilaj veploroj, terure subtilaj, aŭdiĝos
Je la alteco de la cerbo, el la kora ŝalmo...
Estas ja la rompiga horo.
Foriru de mi!
Ne vidu min.
Mi estas terure bela.
Vi blindiĝas...

Per senvestitaj larmoj,
Kie la lumo tremas,
Brilas kaj falas
En la brustan abismon,
Mia vizaĝo ploras
Per okuloj vidantaj deene.

Mistero de la beleco,
Via viktimo, akvon en via oazo trinkas,
En vi, floriĝinta, dronas.

Jen, mi komprenis kio tio estas:
Tiu, kiun mi ne amas kaj pro li mortantas,

Dum la memoro, rompita arbaro pro la
urugano
Pro reveno al si
Dispecigis min...

Fermu la pordojn, la fenestrojn.
Forigu, por ke ne vidu, la infanojn.
Komenciĝis la febroj, mi tremantas.

Mi estas terure bela, en ĉi tiu sfinksa akto,
Kun anĝela sango en la vejnoj.
Mi englutas frenezigajn dolorojn.
Foriĝu!
Blindigu!
Mistero de la beleco,
Via viktimo trinkis en via oazo.
Dronis en vi, floriĝinta...

La morto

Ho, ĉiopotenca eterna silento,
El vi mi pene eliĝis,
Ĉe vi por reveni.
Sed pli peniga estas la reveno...
Bebo mi tiam estis,
Nun mi estas ja homo...

Freneza mi estas pro Campari

Plaĉas al mi Campari, ooo, multe plaĉas.
La edzino, ne, Campari-n ne trinkas.
Kun mia edzino nur kvin minutoj semajne
mi interparolas
Kaj ŝi persono numero unu ne estas.
Ho, freneza pro Campari mi estas...

Sed mi morti ne intencas
Je ĉi maniero
Ne, tie ne mortos mi.
Mi revenos en Usonon kunfrontiĝi
Poste mi denove venos ĉi tie.
Sed, ĉu vi scias kiel oni trinkas Campari-n
Diluante per akvo, per gaso kaj citrono?
Ooo, bongustas, multe, bongustas.

Campari...Eksterordinare mi tion ŝatas.
Tie mi la vojon perdis
Ĉu vi scias kie ĝin mi retrovis?
Ĉe Campari.
Heminguej Campari-n amis,
Neniun virinon...
Heminguej...ne la unua estas
Kiu Campari-n amis...

Ĉu vi al Usono venos?
Kiel? "Por la vojon perdi"?
Plaĉas al mi. Ĉu tio nomiĝas "ironio"?

Freneza mi estas pro Campari...
Campari estas knabino
Kiun mi ege amas.

Elalbanigis



Bardhyl Senimi
(Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Qin Guan (1049-1100)

—*laŭ melodio Rigardo al martajdo*

Sur branĉoj umearbaj floroj
sporadas en malhela la koloro.
Degelas glacipecoj kaj akvfluoj
murmuras kun petolo.
La orienta vent' forblovas
malnovan jaron el memoro
per nova jar' nerimarkite.
Jen ĝuste tempas la Ĝardenon Oro
viziti, kie bronzaj la kameloj ambaŭflanke
de l' vojo por atendi kun bonvolo
la vizitantoj de diversaj lokoj.
Mi paŝas sur sabloza pado sub sungloro
en ekprintempa tag' post pluvo.
Ankoraŭ mi memoras pri la horo,
en kiu mi por rigardi dancflirtadon
de salikflokaj, papilioj en frivolo,
missekvis la kaleŝon de l' alia.

Tiame belaj sentoj en la koro
 kirliĝis kaj interplektiĝis.
 Printempa la pejzaĝ' videblis ĉie
 sub salikarboj, persikarboj jen en bonodoro.

En okcidenta kort' okazas
 festeno nokta kun orgio.
 Tatarajn flutojn muzikistoj ludas
 por akompani kun ĝojkrio.
 La lum' de lampoj en la korto
 jam superbrilas lunon per radio
 blindiga por la okuloj.
 Kaleŝoj galopantaj jen kun kolizio
 frapanta arbojn ĝenas homojn
 spektadi la pejzaĝon de kolorvario.
 La okcidenta korto restas sama
 kiel antaŭe, sed mi vaganto kun pasio
 jam nun maljuna kaj kaduka,
 ekhavas grizajn harojn ĉe l' tempio.
 Mi ja lamentas kaj suspiras
 en la malnova korto pri nenio.
 Krepusk' densiĝas, reklamflago
 de vinvendisto flirtas en ventomagio.
 Ascendas mi la turon, streĉas
 rigardon mian ĝis ĉiellinio.
 Mi vidas korvojn revenantajn
 rondflugi al nestpozicio.
 Mi ankaŭ naskas senton
 de hejmenveo en konscio.
 River'! kunfluu foren
 kun mia nostalgio.

—**laŭ melodio Aromo en tuta korto**

Maldensaj nuberoj jen volvas vuale,
 velkintaj flavherboj sterniĝas al foro
 ĝis la horizonta ĉielo lazura.
 Nun sonas la kornoj — la horo
 por fermi la urban pordegon.
 La ŝipoj, ho, haltu je l' korna sonoro,
 ni kune ektrinku la vinon amaran
 por diri adiaŭ kun kora doloro.
 Multegaj paseoj, ja kiel fumnuboj,
 vanuis senspure el mia memoro.
 Sub suno sinkanta uesten
 kornikoj rondflugas en frosta rigoro,

river' ĉirkaŭfluas vilaĝon
 sovaĝan lante en izolo.

Ekster la imag' la disiĝa momento
 eĉ igas la bildon sentplena.
 Mi kaŝe demetas la parfumsaketon
 kaj zonon satenan, ĉagrena,
 jen kiel donacojn disiĝajn
 kaj donas al mia fraŭlino molĝema.
 Mi ofte frekventas bordelon,
 diboĉas volupte kun kor' senkatena.
 Pro tio jen oni min nomas poeto frivola.
 Do, kiam mi povos en tago revena
 renkonti ŝin por nia kuniĝo?
 Ĉe tio larmperloj je horo festena
 makulas vestaĵojn, manikojn.
 Nun lampoj jam brilas, la urbo
 obskuras je vesperkrepusko korĝena.

Ĉe gastejo

—**laŭ melodio Paŝo sur herbo**

La luno svagas en nebulo,
 pramejo ne videblas plu.
 Rigardo mia serĉas ĉien,
 sed ne troveblas, nu,
 Ĝardeno Persikflora — lando utopia.
 Printempo fridas jen en kontinu',
 Mi sola en gasteja ĉambro
 min sentas febla en enu'.
 La suno sinkas okcidenten,
 kukoloj krias triste per kuku'.

Amikoj sendas al mi
 leterojn, umeflorojn jen de fore.
 Ve, tio des pli amasigas ĉe disiĝo
 ĉagrenojn miajn ja enkore.
 Ho, kial la river' Chen, kiu devus
 ĉirkaŭfluadi senrumore
 la monton, ja insiste flui
 malsupren al rivero Xiangjiang jen laŭvole?

—**laŭ melodio Mil aŭtunoj**

Printempa malvarmo forsvenas
 el bordo, sabl-benk' urbtereno.

En vento skuiĝas florbranĉoj,
 kaj ĉirpoj de la oriol' en ĝardeno
 fadiĝas kaj flugas forŝvebe.
 Mi estas jame degradita, l' ĉagreno
 min premas kaj mi malgrasiĝas,
 vestita en loza vestaj' kun karn-sveno.
 L' amiko, kiun mi atendas
 ankoraŭ ja ne min renkontas per veno.

En Xichi okazis solena kunveno,
 ĝi vivas ankoraŭ en mia memoro.
 Kolegoj altrangaj amase kuniĝis,
 kaleŝoj navedis en knara rumoro.
 Sed oni disiĝis jam disen,
 kiu nun ankoraŭ ĉi-lokas en solo?
 La tempo forpasis senspure,
 mi sonĝas ĉiam en angoro.
 Printemp' jam foriris, falintaj la floroj
 sternaĝas ja kiel ĝen-mar' en la koro.
elĉinigis



Veĵdo (Ĉinio)

Wu Jun (469-520)

Hato sur monta supro

De monta horizonto nun alŝvebas brumo,
 sin montras tra bambuoj subiranta suno.
 Super tegmento birdoj giras, blankaj nuboj
 eliĝas el fenestroj en ĉiela lumo.

Tao Yuanming (ĉ.65-427)

Drinkado (V)

Mian domon tie mi instalas,
 kie agas homoj, sed sen bruo
 de kaleŝoj. Al mi oni faras
 la demandon: Kiel tia ĝuo

povus vin karesi? Kun animo
 pura kvietecon vi jam spektas.
 Krizantemojn, en hejma proksimo,

ĉe l' eosta heĝo mi kolektas;

reflektiĝas en okuloj miaj
 sudaj montoj. En rufa vespero
 plenas atmosferoj idiliaj;
 kaj reflugas birdoj en l' aero.

Vera suko tie ĉi sin trovas,
 tamen ĝin klarigi mi ne povas.

Cao Zhi (192 - 232)

Poemo farita en sep paŝoj

Faboj kuirigas, sube brulas fabotigoj.
 En varmega poto faboj larmas kaj lamentas.
 Origine ambaŭ kreskis el samaj radikoj.
 Kial fabotigoj tiel bruskas kaj turmentas?



Zhang Yu (dum la Song-dinastio)

Bredistino de silkraŭpoj

Ŝi hieraŭ iris vendi silkon en foiro
 kaj, survoje al la hejmo, larmis intensive:
 Tiuj, kiuj portas vestojn el silk' kaj sateno,
 estas ne bredistoj de silkraŭpoj efektive.

Zhu Shuzhen (ĉ. 1135—ĉ. 1180)

Falantaj floroj

Floroj sur interplektitaj branĉoj pompas,
 ilin draŝas ĵaluzemaj pluvofaloj.
 La Printempa Dio regu do konstante,
 kaj ne punktu verdan muskon per petaloj.
elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-KVARA

Xu Wugui

§24-06

Zhuangzi preterpasis la tombon de Huizi tiam, kiam li sekvis funebran procesion. Li turnis la kapon kaj diris al siaj sekvantoj:

“Tu homo el la urbo Ying petis la ŝtonhakiston Shi, ke tiu forhaku de sur lia nazpinto makuleton de kreto, kiu estis tiel maldika, kiel la muŝa flugilo. La ŝtonhakisto svingis sian hakilon kun ekblovo de vento, dume la homo el Ying senmove staris tie. Li forhakis la kretomakuleton sen tuŝeto al la nazo, dum la homo el Ying staris tie montrante nenian signon de timo. Aŭdinte tion, la duko Yuan de la regno Song sendis voki la ŝtonhakiston al si kaj diris: ‘Ĉu vi povus fari refojan provon sur mia nazo?’ La ŝtonhakisto respondis: ‘Mi ja volus fari tion ankoraŭ unu fojon, sed tiu homo, sur kiu mi povis elmontri mian lertecon, jam mortis antaŭ longe.’ De kiam mortis Huizi, mi plu havas neniun, kun kiu mi povus paroli! Mi nun havas neniun dialoganton!”

§24-07

Kiam la ministro Guan Zhong falis en malsanon, la duko Huan de la regno Qi lin demandis:

“Vi grave malsaniĝis, sinjoro, kaj nun estas neeble plu fari la eviton. Mi do permesas al mi demandi, al kiu mi devos konfidi la regnajn aferojn, se via malsano pruviĝos fatala?”

“Al kiu do vi volos ilin konfidi?” demandis Guan Zhong.

“Al Bao Shuya,” respondis la duko.

“Ne,” diris Guan Zhong, “ĉar li estas tro honesta kaj tro pura. Bona homo li ja estas! Sed li ĉiam tenas sin for de tiuj, kiuj estas morale malsuperaj al li. Kiam li aŭdas pri ies kulpo, li tenos ĝin en la menso dum la vivo. Se vi konfidis al li la regnajn aferojn, li limigos vian liberecon kaj ofendos la volon de la popolo, kaj tre

baldaŭ li ofendos eĉ vin mem kaj perdos vian favoron.”

“Do, al kiu mi konfidu?” demandis la duko.

“Se estas neniua alia elekto, Xi Peng taŭgos. Li ĉiam forgesas la kulpojn de tiuj, kiuj estas super li, kaj emas amikiĝi kun tiuj, kiuj estas sub li. Li bedaŭras, ke li ne estas egala al la Flava Imperiestro kaj montras komprenemon kaj simpatian al tiuj, kiuj ne estas egalaj al li. Laŭ li tiu, kiu dividas sian virton kun aliaj, estas nomata saĝulo, kaj tiu, kiu dividas siajn talentojn kun aliaj, estas nomata indulo; tiu, kiu arogante rigardas sin supera per sia virto al aliaj, neniam gajnas ilian koron, kaj tiu, kiu humile rigardas sin malsupera per sia virto al aliaj, ĉiam gajnas ilian koron. Troviĝas iaj regnaj aferoj, en kiujn li povus ne enmiksiĝi; kaj ankaŭ iaj familiaj aferoj, en kiujn li povus ne enmiksiĝi. Se estas neniua alia elekto, Xi Peng taŭgos.”

§24-08

Transpasinte en ŝipo la riveron Jangzi, la reĝo de la regno Wu elŝipiĝis kaj suriris sur la monton loĝatan de simioj. Ekvidinte lin kaj liajn sekvantojn, la simioj time disiĝis kaj forkuris en profundan dornarbetaron. Unu el la simioj sola restis tie kaj sin balancadis sur la branĉoj, kvazaŭ intence montrante sian lertecon al la duko. La duko arkpafis ĝin, sed la simio kaptis la sagon per facila ekmovo. Poste la duko ordonis al siaj sekvantoj, ke ili kune arkpafu, kaj la simio estis mortigita.

La reĝo Wu sin turnis al sia amiko Yan Buyi kaj diris:

“Tiu ĉi simio estis mortigita pro tio, ke ĝi paradis per sia facilmoveco. Prenu tion kiel lecionon! Neniam montru vian arogantecon antaŭ la aliaj!”

Yan Buyi revenis hejmen kaj, preninte Dong Wu kiel sian instruiston, humile studis sub li, por senigi sin je sia aroganteco. Li rezignis plezurojn kaj honorojn. Ĉe la fino de tri jaroj, la tuta popolo de la regno superŝutis lin per laŭdoj.

§24-09

Nanbo Ziqi sidis sin apogante al sia tableto. Li rigardis supren al la ĉielo kaj milde spiradis kun tute senesprima mieno. Tiam lia disĉiplo Yanchengzi eniris kaj, lin vidante, diris:

“Kia neordinara homo vi estas! Ĉu vere vi povas fari vian korpon kiel sekiĝintan lignon kaj la menson

kiel mortintan cindron?”

Nanbo Ziqi diris:

“Mi iam vivis ermite en monta kaverno. Tiutempe Tian He, la duko de la regno Qi, venis min viziti kaj poste rikoltis pro tio abundon da gratuloj de la popolo. Devis esti, ke mi jam akiris al mi famon antaŭ ol li ekkonis min; devis esti, ke mia famo jam disvastiĝis kaj pro tio li venis min viziti. Se mi ne akirus al mi la famon, li ne min ekkonus; se mia famo ne disvastiĝus, li certe ne venus min viziti. Ho ve! Kiel mi kompatas tiujn, kiuj perdis sian veran memon! Kiel mi kompatas tiujn, kiuj kompatas aliajn! Kiel mi kompatas ankaŭ tiujn, kiuj kompatas la kompatantojn! Kaj ekde tiam mi foriĝas de la mondo pli kaj pli malproksime.”

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Yanke (Ĉinio)

Senpova oldulo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Li
olda kun kurba tali'
vagadas
sen klara konsci'.

Sur
vojo diras kun murmur'
li al si
sen ajna plezur'.

Sen
helpo li kun granda pen'
sin trenas
al kabano jen.

Post

longa tempo lia ost'
jam lacas
je fortstreĉa kost'.

En
kabano li per manplen'
da mili'
faras kaĉon mem.

Ve,
kvankam li klopodas tre,
la kaĉo
preparitas ne.

Kun
ĝem' li plendas pri maljun'
kaj sakras
pri nepovec' nun.

Ĉu
venas alies help', nu?
Neniam.
Li jam sen vivĝu'.

Nek
gefilojn li havas, nek
edzinon,
—jen ne lia pek'.

Ĉe
oldag' li kadukas de
senilec',
li jam je pere'.

* *Dekses-Silabo*: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Jadranka Miric (Serbio)

Semajno de Amikeco

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Aŭdiĝas
vintra ventokant'
Tra malnovaj fumtuboj

eĥas sonoj pri mirkant'
bela esperant'.

Semajno
de amikeco!
Festas ĝin amikaro.
Altiĝas fiereco
pro ĉi beleco.

Komuna
plaĉa festado.
Gajas elkoraj kantoj.
Ĝojigas nin retumad'
kaj kordancado!

Je ĉiuj
kontinentoj ni
trovantaj geamikoj!
De varmega Sudo vi
retumas kun mi!

Nek Suno
povas sen Luno,
nek floreto sen pluvo,
nek pano sen faruno,
malbon` sen puno!

Solidareco kaj fratecaj rilatoj dum kovim pandenio

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Ŝajnas ke
en du pupiloj
viaj trembrilas lumo.
Ho, oraj sunradioj.
kreskis esperoj!

Sub neĝo
kreskis floretoj:
galantoj kaj krokusoj.
Bojas gaje hundetoj,
ludas knabetoj.

Batalas
vintro por plua
regado. Blankiĝis val'.

Ĉiel' kaj lago blua
hele lazura!

Malmulton
ni bezonas. Ve,
vivo ŝanĝiĝis multe.
Kronviruso regas tre
krueldanĝere!

Videblas
hipokriteco
precipe ĉe riĉuloj.
Procento de morteco
altas ! Fi eco.!

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma
poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo
xa,xa,a (x=senrima).*

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)

Senplumuleto

Ŝi sidiĝis sur la benkon sub la prunarbo
kaj etendis siajn kruojn por ripozi. Nur la
florbedojn ŝi fosis, sed sentis sin laca. – La
vintro estis longa kaj mi eble tre senmoviĝis.
Sed la printempo jam regas – ŝi direktis
rigardon supren kaj alrigardis la branĉojn de la
arbo. – Nek pruno, nek mirabelo – daŭrigis
voĉe paroli Elena. – Ĝiaj fruktoj estas pli
bongustaj nematuriĝintaj ol maturiĝintaj. La
infanoj ŝatas konsumi ilin nematuriĝintaj.
Kiom aĝa, estas la arbo neniu povas diri. Ĉu ĝi
estas plantita aŭ memkreskinta sovaĝa ĉi tie,
neniu scias – ŝi respiris kaj direktis rigardon al
la malnova domo. Ŝi trovis la arbon
fruktodona kiam ŝi, estiĝinte bofilino, venis en
ĉi tiun domon. Kaj kiom da jaroj pasis de tiam,
probable pli ol kvardek, kaj ĝi ankoraŭ naskas.
Kaj nun ĝi montris multan fruktodonon. La
viroj senbranĉetigis ĝiajn branĉojn por
rejunigi ĝin. Tiel ŝia edzo klarigis la multjaran
vivon de la arbo. Hodiaŭ ili venis de proksima

urbeto, kie ili translokiĝis kun Stojan, ŝia edzo, antaŭ jaroj por perlabori la panon. Estis pli malfacile al ili loĝi en la vilaĝo, ĉar tiam mankis laboro por ĉiuj. Dum vivis liaj gepatroj ili venis, sed pli malofte. Ili iel sukcese plenumis sole siajn taskojn. Sed post kiam la gepatroj mortis, la zorgo pri la domo kaj la korto restis por ili. Dum la somero ili pasigis plej grandan parton de sia tempo ĉi tie. Ili semis tion kaj alion, por helpi sian vivtenon. Kaj ĝi, la tero, estis fekunda kaj dankema. Sed post kiam ŝia dommastro perdiĝis, ŝi ne plu revenis tiel ofte. Ŝia filo, Zdravko, prizorgis la bienon. De tempo al tempo li veturigis ŝin kun si. Kaj nun ŝi estis ĉi tie. Elena volis fari tion kaj alion, sed plejofte por vidi, ĉu la hirundoj denove nestis. Pli ol jardeko ili havis neston en la angulo, sub la tegmento de la malnova domo. Ili kreskiĝis sian idaron tie.

Kaj nun la paro de hirundoj estis ĉi tie. Ilia nesto – inĝeniera konstruado. Mirinde estas tio, kiu instruis ilin kiel fari siajn nestojn. Kiel laŭ fadeno — pinĉopreno da koteto ili metas, kaj poste pajlo por plifortigo. Ŝi rigardis la neston. La malgrandaj kapetoj de la elkovitaj hirundoj estis jam videblaj. Ŝi provis kalkuli ilin, sed ili montris sin jen, kun la malfermitaj buŝoj, jen iliaj kapoj rapide kaŝis. Oni ne povis vidi ilian patrinon, la hirundon. Ŝi nepre iris por manĝaĵo, ĉar ne estas facile nutri grandan idaron. — Unu, du, tri, ... Ili ree kaŝiĝis — provante ŝi ekscii kiom ili elkovis, sed malsukcesis. "Unu, du, tri, kvar ..." — ŝi nombris la malgrandajn kapojn, unu post la alia, kun malfermitaj beketoj, pretaj engluti la manĝaĵon, kiun alportis la hirundo. Ŝi ne povis fini la kalkulon ĉar denove ilia zorgema patrino furioze alflugis sur la neston. Dum ŝi provis kalkuli kiom ili estis denove, ili rapide kaŝis, glutante alian porcion da muŝoj. Ne multe da tempo pasis kaj jen hirundpatrino denove estis super la nesto. Ĉi-foje Elena sukcesis nombri la kapojn. Estis kvar kaj unu beketo. "Kiel ĝi nutros tiom da gorgoj?" — Ŝi

diris laŭte, sed daŭre observis la neston. Sed kio okazas! Ŝi miris pri la agado de la patrino-hirundo. La lasta hirundeto en la linio, kiu apenaŭ montris nur sian beketon ricevis nenian manĝaĵon. Ĝi restis kun buŝeto malfermita. "Verŝajne ne sufiĉis nutraĵo por ĉiuj pro tio hirundpatrino ne plenigis la malfermitan buŝeton de la hirundeto. — Elena daŭrigis pensi voĉe. "Ĝi verŝajne estas la plej malaĝa, pro tio ĝi ne videblas el la nesto." Sed tio, kion ŝi vidis la sekvan minuton, tre surprizis ŝin. Per siaflugilo la hirundo energie eljetis unu el la hirundetoj sur la teron. Ĝi estis eta, preskaŭ nuda. Ĝi falis sur la molan teron, sed post kelkaj sekundoj levis la kapon, kvazaŭ por vidi, kie ĝi estas kaj de kie ĝi venis. La hirundpatrino per siaflugilo metis la aliajn en la neston kaj ekflugis por nova manĝaĵo. Surprizita, Elena ekstaris kaj rapide levis la falintan hirundon. La brusteto de la etulo montris, ke ĝi vivas. Ŝi haste prenis la ŝtuparon, supreniris kaj metis la tre malgrandan hirundeton inter la aliaj hirundetoj en la neston. Ŝi sidiĝis kaj ekatendis. Elena estis scivolema, kion faros la hirundpatrino. La hirundo verŝajne ne rimarkis, ke pretervole ŝi ĵetis sian idon sur la teron. Ŝi ne atendis longe. Jen la hirundpatrino denove aperis kun beko plena je bongusta manĝaĵo. Kaj ili, la hirundetoj, malferminte la bekojn, atendas. Ankaŭ kaj la tre malgranda. Sed kio okazas? Denove la hirundo svingis sianflugilon kaj la malgranda troviĝis surtere. "Ĉu ĝi ne estas kukolo?" — Elena pensis kaj iris rapide kaj reprenis la birdeton. La hirundo denove forflugis. — Ne, ĝi ne estas kukolo! Ĝi estas ŝia ido, kaj ankoraŭ spiras! — voĉe diris Elena. Ŝi remetis la etulon en la neston. Ŝi ne atendis longe. La hirundpatrino jen venis. Ŝi komencis enmeti la nutraĵon en la beketojn kaj ankoraŭ ne finiĝis la tagmanĝo, la etulo estis eljetita. Elena rapide levis la etulon kaj rapidege metis ĝin en sian antaŭtukon kaj premis al sia brusto. — "Eble la varmego povas revivigi ĝin," — ŝi

